

le monde de L'ESPÉRANTO

568-9

numéro

15 février 2009

ÉDITION SPÉCIALE :
NUMÉRO DOUBLE !



FOCUS

L'espéranto à l'honneur en Afrique

PAGE 15

ACTUALITÉS

Nouvelles du Parlement européen

PAGE 5

espéranto
France

3,80 €

- Le calendrier de l'espéranto
- La vie de l'association
- L'actualité en France

éditorial • frontartikolo

Ce numéro est très en retard, vous en êtes mécontents et nous vous présentons nos excuses. Nous souhaiterions étoffer l'équipe de rédaction. «Équipe» est un bien grand mot, car il ne s'agit que de peu de personnes, et nous aimerions trouver d'autres bénévoles pour réaliser un dossier, s'occuper d'une rubrique...



Dans ce numéro, vous trouverez le bilan de quelques grands événements du monde espérantophone pendant l'année 2008. Le congrès mondial qui s'est tenu à Rotterdam à l'occasion du centenaire de l'UEA (dont le siège est dans cette ville), la conférence des enseignants espérantophones au Bénin à Porto Novo, le premier congrès mondial des journalistes espérantophones à Vilnius (Lituanie), etc. Il faudrait citer bien d'autres rencontres, à commencer par les stages qui se déroulent régulièrement dans les centres culturels français, Kvinpetalo et Grésillon, les réunions organisées par les différentes fédérations et bien sûr toutes les rencontres organisées aux quatre coins du monde et qui montrent la diversité culturelle du monde espérantophone, mais ce numéro, même double, n'y suffirait pas.

Au terme de l'année internationale des langues, l'année Zamenhof a été lancée le 15 décembre à Paris à l'Unesco. Et le même jour *La Rue Zamenhof* est enfin sortie dans sa version française. Ainsi a commencé l'année Zamenhof, que vous aurez certainement à cœur de continuer en participant à de nombreux événements culturels en Espérantie. En Pologne, bien sûr, mais aussi plus près au congrès interassociatif où se réuniront Espéranto-France, GEE (enseignants espérantophones), JEFO (Jeunes) et FKEA (catholiques). Bienvenue à tous à Troyes début mai !

Claude Nourmont, rédacteur en chef

La apero de tiu ĉi numero malfruegas, vi certe malkontentas pro tio, kaj ni pardonpetas pro tiu granda prokrasto. Ni ŝatus pligrandigi nian redaktoteamon - fakte temas pri nur tre malmultaj personoj, kaj estus bone se iuj volontuloj sin proponus por verki dosieron, prizorgi rubrikon...

En tiu ĉi numero vi trovos la bilancon pri kelkaj grandaj eventoj de Esperantio dum la jaro 2008 t.e. la monda kongreso kiu okazis en Roterdamo okaze de la centjariĝo de UEA (kies sidejo estas en tiu urbo), la konferenco de ILEI (esperantistaj instruistoj) en Porto Novo (Benino), la tutmonda kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilnius (Litovio)... Necesus citi multajn aliajn renkontiĝojn, ekzemple la staĝojn kiuj regule okazas en la francaj kulturcentroj Kvinpetalo kaj Greziljono, la kunvenojn organizitajn de la diversaj federacioj, kaj kompreneble ĉiujn renkontiĝojn organizitajn en diversaj lokoj de la mondo, kiuj atestas pri la kultura bunteco de la esperanta mondo, sed eĉ tiu ĉi duobla numero ne sufiĉus por raportoj pri ili.

Fine de la Internacia Jaro de Lingvoj, la Jaro Zamenhof estis solene lanĉita la 15an de decembro en Parizo ĉe Unesko. Alia evento je la sama tago: fine aperis la franca versio de *La Zamenhof-strato*. Tiel bele komenciĝis la Jaro Zamenhof, kiun vi certe ŝatos daŭrigi per ĉeesto en multaj kulturaj eventoj en Esperantio: ne nur en Pollando sed ankaŭ pli proksime kiel en la interasocia kongreso en kiu partoprenos kun Espéranto-France, GEE, JEFO kaj FKEA. Bonvenon al ĉiuj en Troyes komence de majo !

Claude Nourmont, ĉefredaktoro

ACTUALITES

► Le Parlement européen s'intéresse à l'espéranto p.5

DOSSIER

► 2008, année riche en rencontres p.8

FOCUS

► Enseignants d'espéranto au Bénin p.15

ASOCIA VIVO

► Unua mondkongreso de esperantistaj ĵurnalistoj p.15

CULTURE

► Vikipedio : pli ol 110 000 artikoloj ! p.17

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (Tél. 09 51 77 18 33 - Fax 01 42 78 08 47 - www.esperanto-france.org)
Tout (sauf réd.) : info@esperanto-france.org
Bimestriel : 6 n° par an - Dépôt légal à parution
Tous droits de reproduction réservés

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : X. Dewidehem

Rédacteur en chef : Claude Nourmont
mondo@esperanto-france.org

Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro :
M. Abada-Simon, M. Arnaud, J. Baratié, F. Bartsch, C. Becheret, D. Bertrand, D. Biro-Walker, R. Boré, E. Debonne, M. Dechy, M.-H. Desert, J.-P. Ducloyer, C. Hurstel, I. Koutny, C. Longue Epée, F. Martorell, H. Masson, B. Moon, H. Ntahonsigaye, B. Schuman, J. Sabiyumva, F. Scibar, R. Triolle, R. Valet. Merci à eux !

Publicité/annonces : à la rédaction

Abonnement : 1 an (6 n°) : 30€ à :

Espéranto-France, CCP : 855.35 D Paris

Impression : IPPAC, Langres (52)

membre de Imprim'vert

Imprimé en juin 2008

Mise en page : Bruno Flochon

ISSN 0775-7698 - Commission paritaire : en cours



Un stand en fête...



Installation du stand

On peut vraiment considérer que la Fête de l'Humanité est un endroit particulièrement adapté pour informer sur l'espéranto. L'accueil du public est très bon. En trois jours, nous contactons directement plus de personnes qu'en de nombreux mois. Le public est varié et ne vient pas uniquement de la région parisienne. Notre présence est à plusieurs niveaux. D'une part une simple visibilité, par notre stand (joli) avec une banderole de 5 m, les affichettes "cours d'espéranto" sur la fête, ainsi que le premier contact avec les calendriers d'Espéranto-Jeunes. Sur la fête ont été diffusés près de 9000 calendriers, édition spéciale Fête de Huma (une première !) très jolie et très adaptée (le slogan était "espéranto, le progrès commence avec la compréhension"). Enfin, il y a les gens qui font un petit tour sur le stand et même ceux qui s'arrêtent longtemps pour discuter. Sur les 500 000 visiteurs de la fête (et il est impressionnant de voir ce monde dans les allées), on peut considérer que presque tout le monde a vu le mot espéranto. Pour

les différents militants politiques et associatifs présents qui tiennent un stand, notre présence tous les ans (avec un stand toujours amélioré et la présence de militants jeunes) donnent une image très favorable de l'espéranto. Or, ces militants, ces bénévoles, ces responsables sont autant de vecteurs d'information. Si par hasard l'espéranto vient dans une discussion, ils n'en ont pas une idée vague, comme quelque chose qui a peut-être existé autrefois. La première image qui vient forcément est celle du stand rouge et blanc de la Fête de l'Huma avec des livres neufs, modernes et des militants jeunes et convaincus.

(d'après le compte-rendu de Frédéric Scibor)



Une carte de vœux inattendue !

L'INES a choisi d'envoyer ses vœux 2009 en espéranto. Une initiative de son directeur qui explique que «l'espéranto était un bon moyen de montrer l'universalité de la ressource solaire sur notre planète et de la planète elle-même».



en bref ● mallonge

● OPÉRATION CHANGER L'AMÉRIQUE

L'idée d'introduire l'espéranto dans les écoles élémentaires des États-Unis se trouve parmi la liste des idées retenues par l'opération www.change.org/ideas. Pendant les derniers jours de 2008, nous avons assisté à une collaboration enthousiaste sans précédent de la communauté mondiale espérantophone et de ses sympathisants. Des collaborateurs de Barack Obama ayant lancé un appel à idées pour «changer l'Amérique», un étudiant ukrainien a proposé que l'espéranto soit enseigné comme langue étrangère propédeutique dans les écoles élémentaires des États-Unis. Dans le cadre d'un vote par internet sur le site www.change.org, cette proposition a atteint la deuxième place dans la catégorie «éducation», avec 2172 voix.

Si un enseignement de l'espéranto comme première langue étrangère était offert dans les écoles primaires, l'apprentissage d'une autre langue étrangère en serait grandement facilité, comme le montre le projet pilote «Springboard to languages» (tremplin vers les langues), présenté dans un certain nombre d'écoles primaires britanniques.

Pendant les dix jours de vote du second tour, au début de cette année, la position de l'espéranto s'est régulièrement améliorée, pour atteindre la 25e place (sur 88 idées retenues). Cette proposition est la première dans sa catégorie.

Le Parlement européen s'intéresse à l'espéranto

La députée européenne slovène Ljudmila Novak a présenté le 21 janvier 2009 à la commission de la culture et de l'éducation du Parlement Européen, sous le numéro PE 416.668v01-00, 3 propositions de modification du rapport de Vasco Graça Moura sur le multilinguisme. Proposition de changement : 4a. (nouveau) constate que le principe d'égalité des langues ne peut être garanti par l'utilisation d'une langue nationale (l'anglais) comme « lingua franca ». Proposition de changement : 4b. (nouveau) propose que chacun conservant et utilisant sa langue, soutenant la diversité linguistique et stimulant l'apprentissage des langues étrangères, étudie la possibilité et l'utilité de l'in-

troduction d'une langue commune construite dans l'UE, comme par exemple l'espéranto. Seul l'espéranto pourrait faciliter l'intercompréhension en Europe et avec les habitants d'autres continents, car il est simple à apprendre et utiliser.

Proposition de changement : 4c. (nouveau) constate que l'introduction de l'euro comme monnaie commune européenne facilite le commerce entre les États membres, favorise la croissance économique et une stabilité accrue dans l'union. L'introduction d'une langue commune pourrait se traduire par des effets similaires, qui ne feraient pas disparaître et ne limiteraient en rien l'usage des langues nationales et autres langues utilisées dans l'UE.



Ljudmila Novak

A quelques mois des élections européennes, c'est une bonne nouvelle pour tous les citoyens que le Parlement Européen se soucie enfin des outils qui permettraient la constitution d'une opinion publique européenne indépendante des schémas de pensée et des blocages nationaux. À défi inédit, outils inédits !

Consultation européenne des citoyens : vote massif pour des propositions en faveur de l'espéranto

Faire de l'espéranto une langue de communication de l'Europe est la proposition venant en tête dans le domaine de l'éducation pour beaucoup de pays de l'Union: Allemagne, Autriche, Belgique, Danemark, Estonie, France, Grand Duché de Luxembourg, Grande-Bretagne, Hongrie, Irlande, Italie, Pays-Bas, Portugal, Slovaquie, Slovénie, Tchéquie. Cette proposition obtient aussi un score favorable en Espagne, en Finlande et en Pologne. Voici quelques témoignages :

Je formule la proposition de faire de l'espéranto une langue de communication de l'Europe, la langue de l'échange, celle par laquelle tout citoyen sera à égalité dans la communication avec son voisin. Il faut pour cela rapidement inscrire l'enseignement de l'espéranto comme première langue vivante étrangère au sein de l'Eu-

rope et mettre en place un enseignement du soir afin de permettre aux adultes de l'apprendre.

Robert Leleu, France

Enseigner l'espéranto pour communiquer facilement en Europe

Aujourd'hui un citoyen européen se déplace fréquemment en Europe. On peut payer avec une monnaie unique, l'euro, mais comment se faire comprendre quand on ne connaît pas la langue du pays ?

Par souci d'égalité entre les pays, l'euro n'est pas une des anciennes monnaies nationales. Il doit en être de même pour la langue de communication commune, qui ne doit pas non plus être celle d'un pays particulier.

L'espéranto n'a pas vocation à remplacer les langues nationales, bien au contraire, il facilite l'apprentissage ultérieur

d'autres langues et, de plus, s'acquière rapidement.

Son côté logique et ludique plaît aux jeunes. Rigoureux, il permet une communication précise. Riche et souple, il autorise autant la création poétique que l'usage professionnel. **Bob Cordeau, France**

L'Espéranto comme langue commune

Les pays de l'Union européenne doivent adopter une langue commune par laquelle tout citoyen sera à égalité dans la communication avec son voisin. Cette langue ne sera pas appelée à remplacer les langues actuellement utilisées mais à les compléter. Ce doit être une langue facile à apprendre, qui sera enseignée partout dans les écoles des pays de l'Union.

Nous proposons que cette langue soit l'espéranto.

Claude Nourmont, Luxembourg

Se préparer au certificat d'études supérieures (Ex tronc commun)

Plus on progresse dans la hiérarchie des examens en espéranto, moins on dispose d'informations à propos de leur préparation. Paradoxal ? Peut être, mais on va essayer d'y remédier.

Nous sommes là pour décrypter le certificat d'études supérieures et vous aider à aller plus vite (et plus loin ?).

- Vous trouverez sur le site benecyrl.free.fr/dosieroj/kapableco quelques sujets dont un sujet de version, un sujet de thème, un sujet de rédaction.

- Pour la traduction, vous disposez d'un dictionnaire en espéranto (PV ou PIV) mais vous n'avez plus droit à un dictionnaire français-espéranto.

- Pour la traduction vers le français, votre texte doit rendre toutes les expressions de la phrase originale, dans un texte qui pourrait avoir été écrit directement en français, ce qui exclut le mot à mot et le charabia, mais également être adapté au niveau social et au discours de celui qui s'exprime. De même, n'utilisez pas de mot technique pour des textes non techniques. On ne vous demandera pas de traduire de la poésie, ce qui impliquerait de produire un texte poétique. Aucun trou n'est acceptable, s'il vous manque un mot ou un concept, approchez-vous le plus possible, mais attention, il ne suffit pas de comprendre, il faut savoir redonner le sens et faire attention aux concordances de temps.

- Si vous cherchez un verbe qui ne vous revient pas à l'esprit, utilisez le PIV pour trouver des synonymes ou d'autres verbes se rapprochant du sens.

- Pour la traduction vers l'espéranto, pensez que vous ne disposez que d'une heure et demie. Attention à la traduction de "avoir" et "être" en tant qu'auxiliaires car l'espéranto est plus précis. Utilisez le caractère agglutinant de la langue et montrez que vous

avez compris comment fonctionne la langue, même si vous n'arrivez pas à « pironumer ». Si vous rencontrez un proverbe, vous devez le traduire dans l'expression consacrée. Enfin, si le français n'aime pas les répétitions qui rendent le style lourd, ce n'est pas le cas de l'espéranto.

- Vous disposez de 4 heures en tout pour les deux traductions. Une pause a lieu avant la rédaction.

Le sujet de rédaction dure 4 heures et porte sur les ouvrages au programme.

- Depuis octobre 2008, les ouvrages au programme sont :

- La vivo de Lanti, Ed.Boorsbom
- La kosmo kaj ni, de David Galadi-Enriquez et Amri Wandel
- Tena, de Spomenka Stimec
- Falantaj muroj, de Trevor Steele

Ces livres ont tous fait l'objet d'une récitation à un endroit ou un autre, ce qui vous donnera une idée de ce que l'on peut dire d'un livre, mais il est clair que vous devez acquérir la capacité à élaborer vos propres critiques et commentaires.

- À la fin de la journée, ou le lendemain, se déroule l'oral de 20 minutes. Pour l'oral, il vous sera posé des questions sur le mouvement. La difficulté est de savoir « où s'arrêter ». Je vous propose de définir ces limites sur la base d'un exemple. Au premier niveau, vous n'avez pas besoin de savoir ce qui s'est passé en 1905. Pour le second niveau, vous devez savoir que le premier congrès mondial d'espéranto a eu lieu à Boulogne-sur-Mer, avec près de 700 espérantophones issus de 20 pays. C'est également l'année où le Fundamento a été défini.

Pour le troisième niveau... il faut connaître plus de choses. Connaître signifie « avoir lu, pris des notes et retenu quelque chose ». Vous devez être capable d'expliquer qu'en 1904, peu de gens étaient capables de parler l'espéranto dont l'usage était surtout écrit. Les rencontres d'espérantophones de nationalités différentes étaient si rares,



qu'on en parlait dans les journaux. Le groupe du Havre a expérimenté une rencontre avec des Anglais et c'est ainsi que l'idée d'un congrès mondial dans une ville balnéaire est née. Pour la première fois, des humains se sont rencontrés et ont parlé dans une autre langue qu'une langue nationale. Le congrès a vu triompher la vision que l'espéranto comporte des valeurs humanistes et qu'il ne s'agit pas seulement d'un outil pour commercer (Vision de De Beaufront). La suite vous appartient...

- Lors de cet oral vous aurez aussi des exemples de phrases à traduire instantanément.

Vous devez identifier la difficulté grammaticale, mais également vous auto-corriger. N'utilisez que des formes reconnues par l'académie mais ne séchez pas sur un mot, prenez une forme approchante. Cet exercice oral est également l'occasion de montrer pourquoi vous avez traduit de cette manière, ce qui ne peut pas être contrôlé à l'écrit. Vous devez donc être capable d'argumenter et de défendre vos traductions.

- Enfin, une partie de l'oral est composée d'une discussion sur les 3 autres œuvres que celle choisie comme support de votre rédaction, pour vérifier que vous les avez lues et que vous les avez exploitées à l'aide de notes.

Cyrille Hurstel

en bref • mallonge

● COMMUNIQUÉ DE L'INSTITUT FRANÇAIS D'ESPÉRANTO (DÉCISION DU 30 DÉCEMBRE 2008)

Dans la liste des quatre ouvrages à étudier pour l'examen du troisième degré (Certificat d'études supérieures) :

«Tena», de Spomenka Stimec et «Falantaj muroj», de Trevor Steele, épuisés, sont remplacés par :

«Ombro sur interna pejzaĝo», de Spomenka Stimec et «La fotoalbumo» (unua volumo), de Trevor Steele.

● BIENTÔT LE PRIX NOBEL ?

Le Parlement polonais a envoyé au Comité Nobel une proposition pour que soit décerné à l'Association Universelle d'Espéranto (UEA) le prix Nobel de la Paix 2009.

Malgorzata Handzlik, en tant que membre du Parlement européen, a aussi envoyé au Comité Nobel une recommandation pour que l'UEA reçoive cette distinction.

● LE 15 DÉCEMBRE 2008 À L'UNESCO

À l'initiative des délégations polonaise et lituanienne à l'Unesco et en collaboration avec l'association mondiale d'Espéranto, une cérémonie en l'honneur du Dr Louis Lazare Zamenhof, initiateur de l'espéranto, a eu lieu le 15 décembre 2008 à l'Unesco. Environ 300 personnes ont participé à la conférence « L'Espéranto, langue équitable » où Louis Zaleski-Zamenhof, petit-fils du créateur de la langue internationale, la linguiste Henriette Walter, et Estelle Loiseau ont lancé l'année du 150e anniversaire de la naissance de Louis Lazare Zamenhof.



Louis Zaleski-Zamenhof et son petit-fils Pierre

La promotion de la démocratie linguistique avec le mouvement Europe Démocratie Espéranto

Le 7 juin 2009, dans les 27 pays de l'Union, plus de 350 millions d'électeurs seront appelés aux urnes pour élire leurs représentants au Parlement européen. Cette élection est l'occasion unique de faire prendre conscience aux Européens de l'enjeu de la question linguistique, pour la construction européenne, comme pour la vie au quotidien.

Fondé en 2003 avec la vocation d'être présent dans toute l'Europe, le mouvement Europe Démocratie Espéranto (EDE) a déjà participé en France

aux élections européennes de 2004 pour défendre la démocratie linguistique et faire la promotion du multilinguisme et de l'espéranto comme langue commune à côté des langues nationales et régionales d'Europe.

Cette fois-ci, les citoyens français ne seront pas seuls à pouvoir défendre la diversité linguistique et culturelle en votant pour EDE. Des sections nationales du mouvement ont vu le jour dans plusieurs autres pays européens et nos collègues allemands sont en bonne voie dans la préparation de leur campagne électorale. Reinhard Selten, le prix Nobel d'économie, a accepté d'être la tête de liste en Allemagne.

Mais pour réussir, pour que des bulletins de vote soient présents partout en France, dans tous les bureaux de vote, pour que le maximum de circulaires et d'affiches soient diffusées et collées,

pour la réalisation des spots de campagne télévisuelle et radio, pour relayer nos messages sur le terrain, Europe Démocratie Espéranto a besoin du soutien de tous.

Comment soutenir le mouvement ?

1. Parlez-en autour de vous et incitez vos amis à rejoindre le mouvement. Proposez-leur de s'inscrire sur la liste d'information des sympathisants, en envoyant un courriel à europa-democratie-esperanto-subscribe@google-groups.com

Ils recevront périodiquement (environ une fois par mois) un courriel les informant des actions du mouvement Europe

Démocratie Espéranto en faveur de la démocratie linguistique et de l'espéranto en Europe.

2. Le mouvement a besoin de correspondants dans chaque département. N'hésitez pas à nous contacter pour étoffer les équipes de terrain.

3. Soutenez-nous financièrement par un don. Un don donne droit à une réduction d'impôt de 66% du montant du versement pour les personnes imposables.

Vous pouvez envoyer un chèque à l'ordre de «AF-EDE-France» à l'adresse : AF-EDE-France, 98 rue Michel-Ange, 75016 Paris.

Indiquez au dos du chèque si vous désirez recevoir un reçu fiscal.

Pour en savoir plus, vous pouvez nous écrire à contact@e-d-e.org ou vous reporter au site :

<http://www.europe2009.fr>

Pour Europe Démocratie Espéranto, l'équipe du Conseil national.



Universala kongreso en Roterdamo, infanaj renkontiĝoj, konferenco de instruistoj en Benino, kongreso de ĵurnalistoj esperantistoj en Litovio, staĝoj en kulturcentroj, regionaj renkontiĝoj, jen kelkaj el la multnombraj kaj variaj renkontiĝoj en Esperantio dum 2008.



2008, UNE ANNÉE RICHE EN RENCONTRES

Pri la 93-a Universala Kongreso de 2008 en Roterdamo, impresoj kaj pripensoj de iu franca kongresano

Jen finiĝis la 93-a Universala Kongreso de Esperanto je sabato 26-a de julio 2008, post unu bone plenigita semajno. Ĝi estis stampita de la jubilea centjariĝo de nia tutmonda asocio. Ĝi estis subtitolita de la kongresa temo pri “Lingvoj : trezoro de la homaro”, emfazante la emon de nia movado apreci kaj defendi la lingvan diversecon. Ĝi kunigis 73 landojn kun entute ĉirkaŭ 1900 partoprenantoj... Dum verdire

En préparation, les prochains dossiers

LME 570 : Espéranto et Internet

LME 571 : L'espéranto en Pologne

Envoyez vos contributions à
mondo@esperanto-france.org

multaj el ĉi-tiuj esperis pli ampleksan kongresanaron en la urbo de la sidejo de la centjariĝanta UEA.

Antaŭ 163 germanoj kaj 127 japanoj, denove la francoj meritis trofeon pro sia trupo el 212 kongresanoj kaj ankaŭ antaŭ 158 nederlandanoj... Eble la proporcio inter tiuj du lastaj nombroj inspiris nian UFE-prezidanton Xavier ? Dum la inaŭguraj sinprezentadoj de la landaj asocioj, li faris gastronomian komparon (favoran al Francio), komparante la nombron kaj la famecon de la fromaĝoj de niaj du respektivaj landoj !...

Ĉi tiu mia raporteto ne estas rezulto de intervjuoj al kongresanoj pri ĉiuj kongresaĵoj. Cetere por tiaj intervjuoj mi havis nek tempon nek kompetenton. Ĉi tiu mia raporto ankaŭ ne estas rezulto de legado de la certe tre interesaj artikoloj de la kongreslibro aŭ de la kongresgazeto “Jubileanto”. Mi certas, ke ĉiuj legantoj de nia revuo povos trovi apud kongresintoj kaj je tre modesta prezo, ties grandvalorajn dokumentojn.

Mi nur provos resume priskribi miajn personajn supraĵajn impresojn kaj unuajn reagojn kaj pripensojn pri kelkaj kongreseroj, en kiuj mi ĉestis kaj kiuj min impresis.

Pri la kongresurbo

Alveninte en Roterdamon, mi unue konstatis, ke la ĉielo estas griza, nuba, pluva, malvarma same kiel en nia Nord-Francio... Feliĉe la vetero plisereniĝis meze de la semajno kaj eĉ ne pluvis dum la merkreda tuttaga ekskurso.

Alveninte per trajno, kiam oni sukcesis elturniĝi el la labirinta konstruejo de la kvartalo de la renovigata stacidomo, oni estas impresata de iuspeca harmonio inter altaj multetaĝaj vitraj konstruaĵoj kaj tradiciaj “normalaj” domoj ofte aranĝitaj laŭ originala plaĉa arkitekturo. Tiu cetere agrabla moderneca ĝenerala

aspekto konfirmiĝos dum la kongresaj ekskursoj tra la urbo kaj apud la haveno kun la “ruĝa” ponto kaj la fama “blanka” Erasmus-ponto – kies klina fostego kaj surtirantaj kablegoj konsistigas la kongresan simbolon sur poŝtkartoj



kaj poŝtmarkoj.

Same impresas la trafika sistemo sur la stratoj, kun plej ofte larĝegaj specifaj vojoj por la biciklantoj, la tramveturiloj, la aŭtomobiloj kun po unu irejo por ĉiu direkto kaj la piedirantoj – kiuj tamen devas resti tre atentaj al la trafiko kaj al la trafiklumoj.

Alia trafa impresado rilatas al la granda nombro – kiun mi taksas proksimume je 50% - da diversdevenaj kaj diverskoloraj roterdanoj. Tiu miksitajo aspektas vere harmonia. Ĝi verŝajne fonte devenas el la antaŭaj kolonioj de Nederlando. Tiun hipotezon konfirmas la granda nombro da “Wok”-restoracioj, kie cetere mi bone taksis la variecon kaj la bongustecon de la manĝaĵoj.

Pri la uzo de la angla lingvo, pri kiu mi eksciis dank’al kongresa prelego, ke ĝi estas oficiala lingvo de la lando kun la nederlanda kaj la frisa, mi ne parolos, ĉar mi devus konfesi, ke mi ne kapablis komprenigi min kaj ke incitetis min la ekskluziva uzo de tiu lingvo...

Pri la kongresejo

Mi bedaŭre vidis sur la stratoj pri nia esperanta kongreso neniun reklamon, kian ni povis vidi en kelkaj aliaj kongresurboj. Sed male estis agrable vidi ĉe la enirejo de la kongresejo kvar flirtantaj verdstelajn standardojn certe taŭge altirantajn la okulojn.

Ankaŭ estis agrable havi je nia dispono en unu konstruaĵo ĉiujn ejojn necesajn por ĉiuj prelegoj, kunvenoj, manifestacioj de la kongreso sen bezono eliri al kromaj eksteraj

salonoj.

Mi tamen iom bedaŭras, ke la plej granda salonego de la kongresejo ne ebligis enteni sufiĉe da ĉeestantoj

por la solenaĵoj aŭ por la distraj kaj kulturaj aranĝoj. Tiu maloportunaĵo estis iel – sed nur parte – korektita per kroma aparta salono kun ekrano. Same en la ĉefa salonego superpodia ekranego kaj bona akustiko ebligis bonan vidon kaj bonan aŭdon de la intervenantoj.

La kleriga lundo restas ĉiama sukceso

Kiel kutime, de kiam estis inaŭgurita tiu sistemo, s v a r m a s a l l o g i t a j ĉeestantoj en plenplenaĵ ĉambroj por aŭskulti interesajn temojn de lertaj prelegantoj. El la dekkvin proponitaj naŭdek-minutaj prelegoj mi elektis tri – po unu en ĉiu sesio.

“Kiel argumenti por Esperanto” instruis al ni Humphrey Tonkin per sia ĉiam sama klarega esprimlerto kaj konvinkpovo. Tiel nun mi bone scias, ke por taŭge argumenti pri Esperanto vi devas unue elekti kolortaŭgan kravaton kaj due esti kapabla resumi ĉiujn viajn diraĵojn en liftovojaĝo inter 23 etaĝoj. Pri tio estis faritaj ekzercoj kun kvino da kuraĝuloj, kies finfine plej preciza kaj trafa argumentado estis: “Vi trovos ĉiujn klarigojn pri Esperanto en interreto”.

Pri “La informiloj” nia amiko François Bartsch kun Renato Corsetti faris komparon inter, unuflanke, la UFE-modaj faldfolioj “Espéranto la langue équitable” ĝenerala kaj unuspeca por ĉiuj alparolantoj, aliflanke la german-modaj faldfolioj specife redaktitaj cele al diversaj fakoj de la alparolantoj.

Ni engrupiĝis laŭ pluraj laborgrupoj kaj ekzercis en redaktado de diversaj german-modaj argumentoj, por studentoj, junuloj, instruistoj, ktp...

Mi taksis tian ekzercon tre interesa. Mi konstatis, ke ŝajnas alargumentoj kaj konvinki studentojn multe pli facile ol alimondistojn... Kaj mi restas konvinkita, ke ĉiuvidepunkte estas pli efika ol la multaj germanaj faldfolioj la ununura franca faldfolio, cetere inspirinta plurajn landajn asociojn kaj rekomendita de Renato Corsetti.



Kadre de “Nia ne-oficiala historio”, pluraj gesamideanoj venis detale kaj sprite raporti pri siaj diversaj agadoj kaj interesaj spertoj, rakontante nekonatajn kaj ofte amuzajn anekdotojn. Pluraj el ili estis iamaj eminentuloj de UEA aŭ de TEJO. Tiel mi havis okazon raporti pri mia sperto de freŝbakita esperantisto en la kabaredo de “La tri koboldoj” dum miaj trijaraj studoj en Parizo en la kvindekaj jaroj. Mi ja kun emocio rakontis pri la poemoj, kanzonoj, vortludoj, spritaĵoj de Raymond Schwartz, Roger Bernard, Flego la kroato, Jean Thierry, Georges Lagrange kaj aliaj, kiujn mi frandis ĉiumerkrede, trinkante bieron al mi pagitan de Schwartz. Mi rakontis ties bierojn, mirabelbrandojn kaj eternan pipon. Mi rakontis kiel, dum mia deviga tradicia sinprezento je mia unua vizito en la kabaredo, neniu el



- la spektantoj volis min kredi pri mia franceco pro mia taŭga akcento de la antaŭlastaj silaboj !!... Kaj fine mi ne povis malhelpi la fluon de kelkaj larmoj...

La kongresan temon “Lingvoj : trezoro de la homaro” alprenis la kongresa rezolucio

Tri fojojn po du horoj ĉiufoje la prelegoj kaj debatoj rilatantaj tiun kongresan temon plenigis la duan plej



Aktivuloj de Kvinpetalo kaj Greziljo- no dum la movada foiro

grandan salonon (Lapenna) de la kongresejo per multege da interesatoj. Sub diskreta - ĉu efika? - gvidado de la kongrestema reĝisoro, ni unue aŭdis tre interesajn prelegojn. Interalie pri la lingvoj oficiale agnoskitaj – aŭ ne – en Nederlando, kie la angla estas oficiala lingvo paralele kun la nederlanda kaj la frisa, kaj pri en Tanzanio la svahila konstruita lingvo, kiu estas sukcese instruata dum la bazgrada lernado de la geknaboj, al kiuj poste ekde la mezgrada lernado estas truditaj kursoj kaj libroj en la angla... ne komprenata de la lernantoj...

Dum la dua kunveno ni diskutis en tri laborgrupoj post pluraj intervenoj de la partoprenantoj.

Dum la tria kunveno tri raportantoj

resumis la konkludojn de la tri laborgrupoj kaj naskis multajn intervenojn kaj komentojn, dum kiuj la plej ofte prononcitaj vortoj estis indiĝenoj, minoritatoj, lingvoj, kulturoj, diversecoj.

Resume kaj miaopinie, la du ĉefnocioj cititaj en la debato kaj al kiuj ni esperantistoj devas atenti estas unue “Diskriminacio” kontraŭ kiu ni devas batali, aktive helpante en la organizaĵoj defendantaj minoritatajn kaj minacatajn lingvojn, kaj due “Hege- monio” - de iu (ajn) “forta” lingvo – aktive intervenante al la politikistoj,

parlamentanoj, gepatraj asocioj, priinstruadaj ministroj, por ke nia lingvo fariĝu por la lernantoj la “ŝatata lingvo” dank’al sia facileco kaj ke tiel iom post iom ĝi fariĝu agnoskita kiel la “dua lingvo” dank’al sia akirita ŝatateco kaj pro sia kontrolita propedeŭtikeco (ŝatiganta kaj faciliganta la lernadon de fremdaj

lingvoj).

Finfine mi trovis ĉiujn argumentojn interesaj, sed mi ankaŭ trovis la tutan debaton ofte iom konfuza. Kaj tiam mi havas grandan admiron al tiuj, kiuj fine sukcesis redakti el niaj diskutoj la finan rezolucion de la kongreso, kies franca traduko aperis en LME 567.

Tri elstaraj prelegoj vekis unuaniman entuziasmon

Ili plenigis siajn salonegojn kaj estis aparte vive kaj interese prezentitaj.

Estas notinda la intereso de ĉiuj prelegoj kaj kunvenoj, ĉar preskaŭ ĉiufoje – ĉiukaze por la de mi partoprenataj aranĝoj – la salonoj estis plenplenaj

kaj la temoj instigis al multaj intervenoj de la partoprenantoj.

Ke ni “Frandu Piron”

Tion proponis al ni Mireille Grosjean, laŭ zorge preparita intervjuo renkonto kun Nicole Piron en Svislando kaj laŭ programo ellaborita de Claude Nourmont. Majstre sursceniĝis Claude Piron. Probal Dasgupta kaj Renato Corsetti rakontis sian renkonton kun Claude Piron, Istvan Ertl prezentis kun Marc Bavant intervjuon farita siatempe antaŭ la publikigo de “La bona lingvo”, oni legis eltiraĵojn el liaj verkoj kaj artikoloj pri nia lingvo kaj nia movado. Estis tiel ebleco iom konatiĝi kun diversaj facetoj de tiu multtalenta homo.

Mi kredas, ke multaj spektantoj estis kiel mi kortuŝe emociitaj.

Du famaj pentristoj Rembrandt kaj Van Gogh

Estis prezentitaj respektive de Ed Borsboom kaj Katalin Kovats, kiuj plene logis la ĉeestantojn. Mi persone ne povis ĉeesti tiujn du eventojn. Sed mia edzino kaj aliaj kunuloj tre varme laŭdis la prezenton, nur bedaŭrante, ke pri Rembrandt ne estis projekciitaj bildoj kaj pentraĵoj kiel por Van Gogh.

La Akademio de Esperanto respondis plurajn demandojn

Eĉ se tiuj demandoj – kaj la respondoj – estas ofte rediritaj dum la diversaj UK ĉiujare, mi tamen frandis la kle-recon kaj la respondemon de niaj akademianoj (eĉ se ili estis ofte sed milde kaj afablege pririditaj de Raymond Schwartz). Mi notis interalie :

Pri “-io” kaj “-ujo”

Denove leviĝis diroj kaj kontraŭdiroj. Tamen, post klariga interveno de Anna Löwenstein, mi konfesu, ke mia io-emo iom ŝanceliĝis, dum mi konsideras ke “-ujo” havas sian pravigon kaj ian ĉarmon...



Letero pri IIK

Viaj infanoj estis en IIK. Ĉu ĝenerale ili estis kontentaj?

Saluton Claude, koncerne nin (mi parolos ankaŭ nome de Annette, la patrino de Lucie), informcele, Lucie partoprenis en la IIK-oj de Jokohama kaj Roterdamo. Lea partoprenis en la IIK-oj de Florence, Jokohama kaj Roterdamo.

En Vilno, Lea vagadis kun ni en la kongreso... estis nia unua kongreso. Do, koncerne nin, IIK 2008 (samkiel la antaŭaj) tute kontentigis gepatrojn kaj infanojn.

Kaj ankaŭ ni tre fieras pri IIK-oj, kiuj estas ega tempo por la knabinoj... kaj tre bona reklamo por Esperanto. Ĉi-jare, mi eĉ konstatas ke IIK estis pli granda sukceso ol UK!

Fakte, eblas ke la esperanta nivelo de pluraj geknaboj (inkluzive Lea kaj Lucie) ne estis sufiĉe alta. Laŭ mi, tio ne gravas... ĉar kiu estas la celo de IIK? Ni ne devas forgesi ke Esperanto estas lerneje instruita preskaŭ nenie. La logika konsekvenco estas ke neniu infano lernas Esperanton, krom en sia familio se tio eblas... Se IIK akceptus nur infanojn kiuj flue parolas Esperanton, IIK nur akceptus la denaskulojn (kiom?) kaj la infanojn kiujn oni trudis lerni Esperanton (pri tiuj-ĉi, kiom deziros resti en la movado kiam ili adoleskiĝos?). Mi do

konsideras ke akcepti nur flu-parolantajn infanojn estus stultaĵo... Esperantio iĝus privata klubo!

Se oni volas divastigi Esperanton, oni devas konsenti pri la fakto ke alvenos homoj (kaj infanoj) kies nivelo estas malalta je la komenco...

Ni tre ŝatas la nunan manieron organizi IIK-on. Bert postulas ke la infanoj parolu flue, sed akceptas ĉiujn... Tiuj kiuj estas komencantoj (foje komencontoj) klopodas por plibonigi sian parol-kapablon antaŭ la kongreso. Kaj se ili ne tre bone parolas la unuan jaron, ĝenerale, la afero pliboniĝos ekde la dua jaro: tio estas tre bona kompromiso! (mi kredas ke vivo estas kompromiso...) Pri tio, mi konfesu ke sen UK-oj kaj IIK-oj, nia grupo verŝajne ne plu ekzistus! Mi do kredas ke la malalta nivelo de kelkaj geknaboj ne estu problemo, sed ĝojo, ĉar tio signifas ke novaj homoj aliĝas la movadon!

Por konkludi, mi volas ankoraŭ unufoje danki Bert kaj lian teamon pro ilia laboro, atento al la infanoj kaj mi esperas ke ankoraŭ en 2009, Lea kaj Lucie septembre imitos Bert-on kriptante "ne krokodilu"!

Kompreneble, Lea kaj Lucie partoprenos en la bialistoka IIK-o. (Lea kiu havis tre malaltan nivelon je sia unua IIK, partoprenis ĉi-semajne en la duanivela staĝo de Bouresse sen problemoj). Amike,
Daniel Biro

40a Internacia Infana-junula Kongreseto

25. julio - 1. aŭgusto 2009 - Suprasl, Pollando

Nun pretas kotizo kaj aliĝilo de IIK 2009. Vidu ĉe <http://bertosch.free.fr/iik2009/index.html#alighilo> 7- ĝis 15-jaraj infanoj konsistigas la kutiman aĝon inter la IIK-anoj. Ĝis la 31a de marto, aliĝo kostas nur 230 eurojn.

Gastigos nin la lerneja junulargastejo "Bukowisko" en la "Eduka Centro de Suprasl". En la urbeto Suprasl vivas ĉ. 5000 loĝantoj, ĝin ĉirkaŭas arbaro kaj trafluas la rivero Suprasl. La bela historia urbeto situas 16 km nordokcidente de la urbo Bjalistoko kaj atingeblas per busoj.

Malantaŭ la centro fluas la rivero Suprasl, laŭ kiu nomiĝas la urbeto. 300 metrojn for de la centro situas publika banstrando ĉe lago, kiun formas la rivero Suprasl. Eblas lerni remi en kajakoj per du-padela pagajo kaj poste sekvi gvidatan 4-horan kajak-eks-

kurson. Ekster la urbeto situas bela arbaro por migri aŭ bicikli. En la arbaro eblas okazigi gvidatan fajron kun kolbasrostado. Per buso eblas viziti la termalan banlokon Augustów aŭ la Nacian Parkon Biazowieca kaj vidi i.a. bizonojn kaj grandegajn kverkojn. La regiono somere varmas averaĝe 20°C.

Ni planas unu gvidanton por ĉiu seso da infanoj, estos 2 polaj helpantoj kun ni. Por helpi la infanojn ĉiam paroli nur en E-o, la matenojn ni planas dediĉi al lingvaj ludaj aktivecoj. Laŭeble Esperanto-kurso, aparte por krokodilemaj infanoj. Pri posttagmezaj aktivecoj ni decidis laŭ la vetero inter ekskursoj, sporto aŭ manlaboroj. Vespere okazos ludoj (Luphomoj...), laŭtlegado de rakonto, muzika prezento, ktp.

Bert Schumann

●●● Pri la prepozicio “po”

Pri ĝia preciza signifo kaj la eventuala uzo de akuzativo post nombro enkondukita de la prepozicio, la klarigoj estis tre konvinkaj. Sed restas ke la taŭga apliko estas ne ĉiam plej facila... Iu ikonoklasta akademiano sugestis, ke ni rezignu pri la uzo de tiu propozicio... Kien ni iru ?

Pri la apliko de 15-a fundamenta regulo

Mi asertas al vi, ke mi povis aŭdi tri akademianojn eldiri tri malsimilajn vortojn pri “komputoro”, “komputero” kaj “komputilo”.

Ĉu ne eblus regulo por difini la esperantan gramatikan esencon de tiuj radikoj “internaciaj”? Ĉu verba radiko “komput’i” (kiel en la PIV) naskanta “komputilo”, aŭ ĉu substantiva radiko “komputor’o” naskanta “komputori”?

La UEA-komitato aktive laboris dum la tuta kongreso

Mi ne ĉeestis la plenajn kunsidojn de tiu komitato. Mi simple partoprenis en interesaj utilaj kunvenoj pri :

Subkomitato 2. Informado, en kiu Barbara Pietrzak elmontris sian kompetenton kaj sian entuziasmon.

Subkomitato 8. Eksteraj rilatoj, en kiu Ranieri Clerici raportis pri la

rilatoj de UEA kun UN kaj Unesko. Li proponis, (kaj estis aprobite) ke la oficiala nuna ununura “Internacia jaro de la lingvoj” estu daŭrigota de UEA kadre de “Internacia jardeko de lingvoj”.

Kandidatigo de UEA al la pripaca Nobelpremio de 2008

Pri tiu problemo mi ne havis eblecon paroli dum la ĉi-supra kunsido de la eksteraj rilatoj, sed mi estis intervjuita de Renato Corsetti cele al lia raporto farota pri la afero. Jen miaj rimarkoj.

Unue, jam estas atingita grava reklama efiko pri la “Lingvo Esperanto” (mi pli ŝatas tiun vortumon ol “UEA-asocion”). Tiun reklamon faritan komence de februaro 2008 de mondaj amaskomunikiloj ni ŝuldas al la agado de Mireille Grosjean kaj de la du svizaj parlamentanoj de ŝi konvinkitaj, kiuj sendis proponleteron al la Nobel-Komitato – kaj sciigis tion.

Due, ekde la fino de januaro kaj ĝis oktobro, kiam estos konigita la premiito, la regulo estas silentado pri la laboroj de la Nobel-Komitato kaj de la Nobel-Instituto.

Trie, malgraŭ tiu regulo pri silentado, dank’al verŝajna maldiskretaĵo, ni sciis, ke estos ekzamenataj entute 67 kandidatigoj (inter kiuj ja estas konfirmita la “Lingvo Esperanto”).

Kvare, kvankam ĝis aŭgusto 2007 multaj landaj asocioj ne reagis al miaj instigaj cirkuleroj, argumentaroj, modeloj de proponletero, pluraj el ili vekigis kaj kontaktis min post la instigo de la UEA-komitato en Jokohamo. Entute, mi estis sciigita pri la sendo de 68 proponletoj de diversaj parlamentanoj kaj universitataj profesoroj, kio estas sufiĉe kontentiga nombro. La plej multnombraj proponantoj estas universitataj profesoroj de Demokrata Respubliko

de Kongolando (Kinŝasa). Sekvas Francio kun dek proponletoj (8 de parlamentanoj, 2 de universitataj profesoroj).

Kvine, tiu lasta franca atingo pruvas la efikon (certe ne nur por Nobel-premiaj aferoj) de konstanta, regula, obstina agado al la politikistoj, parlamentanoj kaj ministroj, pri kiuj oni ne devas forgesi, ke ili estas la decidpovaj leĝfarantoj kaj leĝaplikantoj.

Ĝemelaj urboj

Mi havas la impreson, ke – krom la sola S-ro Wu specife taskita pri la problemo kaj kiu ne povis esti en Roterdamo – la UEA-eminentuloj ne multege baraktas pri tio. Dume mi kredas, ke tiujn ĝemelparojn kaj ties oficialajn manifestaciojn povus efike eniri la esperantistaj grupoj de la ĝemelaj urboj kaj tiel efike reklami por Esperanto, elmontrante la paralelajn celojn de Esperanto kaj de urboĝemeliĝo por la kontaktado kaj la komunikado inter urboj kaj homoj. Dum specifa kunveno, kelkaj personoj prezentis rezultojn de siaj ĝemeliĝoj. Aparte la germana “Esperanto-urbo” Herzberg montris sian aktivadon kaj siajn bonajn rezultojn sur tiu tereno (inkluzive eklernadon de Esperanto far pluraj civitanoj de ambaŭ urboj). Ankaŭ mi intervenis. Mi ja eksciis nur antaŭ unu monato pere de S-ro Wu, ke Lille estas unu el la 13 (!) ĝemeloj de Roterdamo. Do, kiel membro de la E-grupo de Lille, mi skribis al la municipo de Lille – kaj ankaŭ al Roterdamo por emfazi pri nia kongreso. Mi ricevis nenies respondon. Sed mi reskribis al Lille, sendante kaj komentante la francan version de mia rezolucio kaj petante ke Lille informu nian E-grupon okaze de venonta ĝenerala manifestacio, tiel ke ni povu sciigi kaj inviti niajn roterdamajn amikojn.

Eŭropa Esperanto Unio konvike parolis pri sia agado





Gvidis la kunvenon la estraro, t.e. Sean O’Riain, Zlatko Tišljar kaj Flory Witdoeckt. Ili sciigis pri stipendio donacita al EEU de eŭropuniaj instancoj.

Ili prezentis projekton de filmo laŭdire prezentanta esperanton kaj estontecon. Certe mankas en la nuna projekto paroloj kaj komentoj sed mi devas konfesi, ke mi ne bone komprenis la filmon kaj ke mi ne ŝatas ĝin.

Parolante pri EDE, Sean precizigas, ke EEU deziras havi bonajn kaj konstruivajn rilatojn kun EDE, sed li insistis pri tio ke EEU laboras sur alia tereno, esence lingveca kaj stampita de neŭtraleco.

Parolante pri strategio, Zlatko rekomendis konstantan agadon de la landaj asocioj al la politikistoj, parlamentanoj kaj ŝtataj instancoj (laŭ sistemo, kiu fakte estas tiu uzata de pluraj jaroj far UFE!...).

Sub gvidado de Flory, ĉiuj (preskaŭ) ĥore kantis la himnon al Eŭropo laŭ

la muziko de Beethoven alprenita de Eŭropa Unio kaj laŭ la paroloj de Umberto Broccatelli.

(Bonvolu noti, ke tiun esperantan eŭropecan version de Umberto jam plurfoje de tri jaroj publike kantis nia modesta koruso de Bersée apud Lille... kaj kun granda sukceso).

La IKU kiel kutime proponis interesajn prelegojn

Mi bedaŭras, ke mi ne havis eblecon aŭskulti ĉiujn prelegojn. Laŭ la aŭskultintoj ili estis faritaj en bonege regata lingvo de fakuloj pri astronomio kaj klimato, pri ekonomiko, pri kuracado kaj infanmedicino, pri historio, pri poezio kaj kompreneble pri lingvistiko.

Pri tiu lasta fako mi aŭskultis la prelegon majstre kaj amuze faritan pri “La mirinda mondo de la parolsonoj” de John Wells... sen iu ajn briteca akcen-



to. La prezento de “Publika opinio pri la utilaj lingvoj en Eŭropo”, farita laŭ statistika senkomenta iom seka modo de J. Pietiläinen, estis malpli viva kaj loga ol la Wells-aĵo. Mi ve memoras el tio la hegemonian rapidan progreson de la angla kaj la kolapsadon de la franca kiel de la germana.

La paroligaj lecionoj de “Edukado-net” ĉiam same plaĉas

La dua parto de la kongreso okazis en la Parlamento de Litovio, kie la prezidanto de la parlamento, Ceslovas Jursenas, bonvenigis nin kaj vespere regalis nin per akcepto en parlamenta restoracio. Aliajn vesperojn nin sole akceptis la urbestro de Vilno kaj la ĉefministro de Litovio. Specialan numeron de nia revuo, kies dosiero temas pri Litovio mi persone transdonis al la eminentaj gastigantoj.

La kongreso akceptis 16 konkludojn kaj rekomendojn por la esperantistaj amaskomunikiloj. Ĝi ankaŭ sukcesis en la ambicia celo reaktivigi la fakan asocion TEĴA kies nova prezidanto fariĝis litova radia kaj televida ĵurnalista Audrys Antanaitis, ankaŭ vicprezidanto de Litova ĵurnalista Asocio (LĴA).

La ĉefa motoro de la afero, Povilas Jegorovas, ŝparis nek energion nek rimedojn. Li sukcesis ricevi la subtenon de litovaj aŭtoritatoj, dank'al kiuj la kongreso povis okazi en tiom bonaj kondiĉoj kaj realigis la celon ne nur kunveni aron da ĵurnalistoj por valora interŝanĝo de spertoj, sed ankaŭ renaski TEĴA-n. Alivorte, li sukcesis fari miraklojn. Ni bezonus kelkajn Povilas ĉe ni !

Claude Nourmont

(1) Revuo Esperanto, 1216 (7-8) julio-aŭgusto 2008, p. 147

Appel à suggestions

Une jeune adhérente de Espéranto-Bordeaux-Ouest qui a reçu un chien-guide d'aveugle du centre Aliénor, école de chiens-guides d'aveugles à Mérignac, a demandé à la direction de cet établissement et obtenu que l'on donne des noms en espéranto à la prochaine promotion de chiens.

Nous sommes très sensibles à cette marque d'estime pour l'espéranto puisqu'habituellement les noms sont choisis par Aliénor ou les élèves qui lui vendent des chiots, son propre élevage ne pouvant en fournir assez.

Cette année l'initiale prévue est la lettre D. Ceux qui voudront proposer des noms pourront les adresser à Christelle Rey, 7 rue des Hirondelles, 33520 Bruges, qui transmettra ces noms et continuera ainsi son action dans ce milieu assez peu connu.

Sachant que l'élevage et le dressage d'un chien-guide revient à 20 000 euros et qu'il est remis gratuitement, toute participation, même minime, serait appréciée.

(communiqué par Espéranto-Bordeaux-Ouest, 19 rue Dépré, 33200 Bordeaux-Caudéran)

Vojaĝo al Bjalistoko

La federacio de Langvedoko-Rusiljono organizas busan vojaĝon al la UK de Bjalistoko (forirdato de Montpellier la 22an de julio, reveno la 4an de aŭgusto, kvartaga veturado ; vojirado tra Montpellier, Lyon, Mâcon (TGV el Parizo), Strasburgo, ktp.

Detalaj informoj ĉe : Jean.henin@wanadoo.fr aŭ telefone 04 66 32 86 36

Instrui komputiluzon

En gvatemala vilaĝo estas lernejo, kiu ricevis 9 komputilojn novajn sed la ministerio ne sendas aŭ

pagas intruiston por instrui al homoj, kiel funkciigi ilin. Estas serĉata volontulo, kiu pretus instrui dum almenaŭ 3 monatoj, sed prefere dum la tuta lernoĵaro 2009. Mi pretas senpage disponigi mian domon, kiu situas tute proksime de la lernejo ĉe unu el la plej belaj belvidejoj el la mondo, al la lago Atitlan kaj al la sunsubiro malantaŭ la vulkanoj.

La instruisto povus tagmanĝi senpage kun la lernantoj, entute 60. Ankaŭ estos eblecoj instrui esperanton.

Philippe Chavignon, werphatao@hotmail.com

Informiloj pri Esperanto

La Nacia Pedagogia Universitato mallonge UPN pere de Junulara Esperantisto de UPN petas malnovajn revuojn kaj kelkaj afiŝojn por varbi la studentojn pri la intereso de Eo legante revuon :

Sro Lukolama Lufimpu
C/o Mampuya Diakiese
B.P.7598, CILU, KINI
CD-Kinshasa
Kongo(Dem. Resp.)

Sendo de revuoj

Honoré Sebuĥoro estas esperantisto en Orienta Kongo. [Ne trompu vin la poŝta adreso. Konganoj havas adresojn en Ugando, kie la poŝta servo funkcias pli bone.]

Liaj lernantoj ŝatas legi revuojn en Esperanto. La preferataj estas Monato, Kontakto kaj Juna Amiko. Kiu povas sendi al li kelkajn malnovajn numerojn ?

Honoré SEBUĤORO
Eglise Cebce Remera/DR Congo
PO Box 08
Bunagana-Kisoro/Ouganda
(Honsebn@yahoo.fr)

Lernolibroj serĉataj

Kiu povas sendi lernolibron al ĉi tiu studento en Alĝerio? Se li ricevos

kelkajn ekzemplerojn, tio estos bona, ĉar li volas instrui al siaj kunstudentoj.

Manimpaye Pasteur
Annaba 23000
BP 123 Hippone-Annaba
c/o Basilique Saint Augustin
Algérie

Korespondpetoj

• Mi nomiĝas Jules Bukeni Rushigira, mi loĝas en Demokrata Respubliko Kongolando, Uvira teritorio, Mulongwe kvartalo, 30 junio strato no 8.
(rushigira2@yahoo.fr)

• Mi nomiĝas Romeo kaj loĝas en Togolando. Mi lernis esperanton ĉe instituto Zamenhof kaj havas la diplomojn A kaj B. Nun mi deziras korespondi kun iu esperantisto kun kiu mi skribos kaj parolos pri io ajn en la mondo.
(kouessanromeo@yahoo.fr)

• María de los Angeles González Valdés, bibliotekistino.
Mi loĝas en Kubo. Mi estas lernantino de Esperanto kaj mi deziras korespondi kun personoj (bibliotekistoj, instruistoj...) de Francio.
Adreso : Calle 49 #203NE entre 2 y 4 Cienfuegos. CP. 55100. Cuba.
(marangeles69@yahoo.com)

• Mi deziras korespondi. Mi estas burundilandano, 25jara, kaj mi loĝas en burunda ĉefurbo Buĵumburo. Mi estas studento ĉe la nacia instituto pri publika sano sed mia studenta vivo ne estas facila pro milito kiu regas en nia lando. Mi komencis lerni Esperanton ekde decembro 2007 kaj mi estas instruanta aliajn personojn en klubo sed ofte mankas gazetoj, libroj, dokumentoj ktp pri ni
Nsengiyumva Eric eridonald_1@yahoo.fr

Vikipedio : pli ol 110 000 artikoloj en Esperanto !

En Vikipedio, <http://eo.wikipedia.org>, la Esperanto-versio de "Wikipedia", estas hodiaŭ 110 361 artikolojn en Esperanto. Laŭ la ĝenerala multlingva statistiko ĝi situas je la 22a loko inter 264 lingvoj. Por ke Vikipedio progresu, ne nur laŭ nombro de artikoloj, sed ĉefe laŭ kvalito kaj fidindeco, trejnseminario okazis antaŭ nelonge apud Prago kadre de la Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). Por faciligi la arigon, instruadon kaj trejnadon de kunlaborantoj, Yves Nevelsteen kreis, kadre de la plurlingva retejo e@i (Edukado@Internet : www.ikso.net/eo/index.php), retejon www.vikipedio.net kiu ebligas al interesatoj trovi helpon kaj konsilojn. Interesatoj kaj informantoj trovos, i.a. prezenton pri la nova libro "Vikipedio por vi" de Ziko van Dijk, liston de asistantoj, konsilantoj kaj helpantoj



ĉe www.vikipedio.net/index.php/Teamo_de_asistantoj.

Kvankam ne sperta vikipediisto, dum longa tempo nur okaza kunlaboranto, mi lastatempe malkovris tie eblecojn pri kiuj ni ne sufiĉe atentis. Ekzemple, mi redaktis, surbaze de la franclingva artikolo de "Wikipedia" pri la gazeto "Ouest-France", artikolon por la Esperanta versio. Komparu <http://fr.wikipedia.org/wiki/Ouest-France> kaj <http://eo.wikipedia.org/wiki/Ouest-France>

Multaj ĵurnalistoj en la mondo konas la ekziston de Wikipedia kaj de ties multegaj lingvaj versioj (ĉ. 250).

Se Esperanto ne aperas inter ili por artikolo pri ilia publikaĵo, ili opinias tute nature ke ĝi ne ekzistas. Pri "Ouest-France", aldone al Esperanto, aperas nun Brezhoneg, Deutsch, English, Español, Français, Polski.

Unu el niaj urĝaj taskoj konsistas en monro de nia ekzisto.

Esperanto vivas en pli ol cent landoj kaj certe en plejparto el ili ekzistas kelkaj kapabluloj por esplori la eblecon redakti artikolojn pri la naciaj



Nova jardeko de Interlingvistikaj Studoj en UAM

La nuna septembra sesio de la Interlingvistikaj Studoj (en Universitato de Adam Mickiewicz, Poznano) estis escepta, ja kompletigis la unuaj 10 jaroj. La evento estis festata per internacia simpozio pri la lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko (18-19 sept.), kiun partoprenis 85 homoj el 22 landoj (programo kaj raporto ĉe <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl>). Ĉeestis ankaŭ la gvidantoj de la universitato kiuj esprimis sian kontenton.

Parto de la tria grupo plenumis sian finan ekzamenon post 3-jara studado prezentante siajn diplomlaboraĵojn. Gratulojn al Marc Bavant (La viva genro preter akordo. Interaĝoj de semantiko kun sintaksa rolmarkado, Francio) ; Kirilo Brosch (Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio, Germanio) ; Anne Jausions (La plej oftaj malfacilaĵoj de



franclingvaj Esperanto-parolantoj, Francio) kaj Horst Vogt (Komunikad-problemoj en la institucioj kaj en la membroŝtatoj de Eŭropa Unio - ĉu teorie kaj politike solveblaj? - Germanio).

Malgranda, sed entuziasma nova grupo komencis siajn studojn inter la 13-17a de septembro. Alvenis po du partoprenantoj el Brazilo, Irano, Kroatio kaj Usono, po unu el Francio, Grekio, Koreio kaj Ukrainio. La ĉeestantoj aŭskultis kursojn pri ĝenerala kaj esperanta fonetiko de John Wells (kun interesaj ekzemploj), pri esperanta kulturo de Aleksander Melnikov (kiu ĉerpis ankaŭ el sia nova libro pri vortludoj) kaj Zbigniew Galor, pri la unua periodo de esperanta literaturo de Lidia Ligcza kaj Tomasz Chmielik, pri komunikado de Ilona Koutny (kie la partoprenantoj nature povis sperti la diferencojn kaj similecojn en la metakomunikado). Pluraj prelegoj de la simpozio kaj de la sekva Arkones (semajnfina kultura renkongtiĝo) kompletigis la kursojn.

Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

amasinformiloj, eĉ se ne tiel detale kiel mi faris por “Ouest-France“. Mi elektis tiun gazeton ĉar mi loĝas en ĝia vend-areo (okcidenta Francio). La laboro ne estus tre peza por unuopuloj se en ĉiu el niaj administraj unuoj (provinco, regiono, departemento, urbo, vilaĝo, ktp) ni farus tiel.

Interretan aliron al eble ĉirkaŭ 14 000 nomoj de papergazetoj

Bonegan laboron faris nia bedaŭrata Franko Luin per kreo de la trilingva retejo “Kiosken“ (EO, SE, EN, www.esperanto.se/kiosken/eo), kiu ebligas interretan aliron al ĉirkaŭ 14 000 nomoj de papergazetoj (aperis statistikoj en la tempo de Franko, sed bedaŭrinde ne plu de kiam ties administradon transprenis Sveda Esperanto-Federacio). Tio konsistigas jam bonegan laborbazon, aldone al tio, kion liveras alilingvaj versioj de Wikipedia, sed tio ne malhelpas kreon de pli detalaj artikoloj por Vikipedio. En tio devus kunlabori ankaŭ E-ĵurnalistoj. Kompreneble, oni povas verki ne nur pri amasinformiloj.

Propra sperto

Kiel okaza kunlaboranto de Vikipedio, iom pli regula lastatempe, mi konstatas oftajn mankojn. Pli bona kunordigado de la ekzistantaj kapabloj ebligis forigon de eraroj ortografiaj aŭ gramatikaj, de neĝustaj informoj, kompletigon de artikoloj, aldonon de novaj, ktp. La iniciato de e@i estas tiurilate bonvena. Okaze de redaktado de miaj artikoloj, precipe pri Marie Marvingt, mi ofte konstatis ke nomoj de urboj kie ŝi faris ion (ŝi faris multon kaj multloke!) aperis ruĝe. Tio signifas ke ne ekzistas pri ili artikolo en Esperanto. En mia plej lasta artikolo pri la bretona verkisto Émile Masson (http://eo.wikipedia.org/wiki/%C3%89mile_Masson),



mi same konstatis la mankon de almenaŭ bazaj informoj pri verkistoj, artistoj, politikaj kaj sindikataj gvidantoj, ktp, ekzemple pri Pontivy (<http://fr.wikipedia.org/wiki/Napol%C3%A9onville>) (Morbihan), kie vivis Émile Masson. Ni tamen ne havu kompleksos de malsupereco, mi ĵus rimarkis ke laŭ la versioj katalunlingva kaj hispanlingva de Wikipedia, Émile Masson mortis en Brest (lia naskiĝurbo) dum li fakte mortis en pariza malsanulejo kaj estas entombigita en la pariza tombejo de Ivry...

Se oni musklakas sur ruĝe skribitan nomon, tiam prezentiĝas blanka spaco preta por verki artikolon. Sed artikolo estas registrebla nur se oni estas mem registrita kiel kunlaboranto. Tiucele, oni klaku sur “Krei novan konton“, dekstre, tute supre.

Ĉiu trovu sian vojon

Bonŝance, esperantistoj estas ne malmultaj, eĉ se malpli ol ni deziras. Ne neglektinda parto el ili havas kompetentecon pri difinita temo. Artikolo pri urbo aŭ vilaĝo povas esti laboro de Esperanto-grupoj aŭ tasko por

progresantoj en administraj landaj unuoj (provinco, regiono, departemento, distrikto, urbo, ktp.). En Francio ekzistas 36 785 komunumoj (http://eo.wikipedia.org/wiki/Komunumoj_de_Vend%C3%A9e).

Bonvolu kontroli ĉu tiu, kie vi loĝas aŭ/kaj laboras aŭ kutime libertempas aperas ruĝe aŭ blue.

Artikolo pri homo famiĝinta pro sia aktivado, profesia aŭ alia, povas esti laboro de persono loĝanta ie ajn, kiu interesiĝas aŭ emas esplori pri li aŭ ŝi. Faka artikolo estu prefere verkita de membro de faka Esperanto-asocio (http://eo.wikipedia.org/wiki/UEA_

Fakaj_Asojioj). Jen bona tereno por progresigi la vorttrezoron kaj stimuli membrojn!

Legantoj de

Esperanto-publikaĵoj el la tuta mondo povas proponi enciklopediajn artikolojn

Legantoj de Esperanto-publikaĵoj kaj asociaj organoj el la tuta mondo povas proponi enciklopediajn artikolojn cele al aperigo en Vikipedio. Se aperus en ĉiu numero pli malpli longa kontribuajo, aldoniĝus centoj aŭ eble miloj da artikoloj.

Iam mi proponis kaj konsilis, por la gazeto La Sago, aperigon de rubriko “Kontribuajo al Vikipedio“ por artikoloj poste enretigitaj en Vikipedio. Tio estis foje farita, sed ne tiom ofte kiom mi deziris. En tio povus kunlabori membroj de asocioj kaj abonantoj de publikaĵoj, eĉ modestaj. Eĉ tiuj, kiuj ne sentas emon aŭ kapablon fari tiun interretan laboron, povas tamen kontribui al pliriĉigo de nia enciklopedio. La enretigon povus prizorgi rete pli spertaj esperantistoj. Se ĉiu Esperanto-revuo aŭ eĉ loka informfolio aperigus sisteme en ĉiu numero almenaŭ unu artikolon sub enciklopedia formo uzebla por Vikipedio, rapide kreskus la nombro de kapvortoj (artikoloj). Laŭ lasta ĝenerala statistiko de Wikipedia, Esperanto estas nun je la 22a loko. Povas esti ke la slovaka puŝos Esperanton al la 23a loko post ne longa tempo. Urĝas vekiĝi!

Laŭ mesaĝoj de Henri Masson www.ipernity.com/home/32119 espero.hm@wanadoo.fr



Muzikaj novaĵoj

La Perdita Generacio “eksplozivas vian domon”, nova albumo

La Perdita Generacio, konsistas el naŭ grupanoj, kvar muzikistoj kaj pluraj helpantoj. La muzika kerno de la bando estas geografie centrita en Hernusando en norda Svedio.



Foje rapide kaj ironie, foje ĝentile kaj pensige, LPG evoluigas sian unikan sonadon ĉe la limo inter mondmuziko, popo kaj kanzonoj. Kelkaj tekstoj senkaŝe kritikis la modernan socion el verdula vidpunkto, sed pli ofte la poemoj estas tre personaj kaj la plej profunda radikaleco preskaŭ malvideblas unuavide. Ke fenomenoj ne normalas estas revenanta temo sur la disko.

Kuraĝu sidiĝi apud la fajro kamena kaj kuŝiĝi sub fortepiano en Kiev' kun La Perdita Generacio. Certe vi ne restos netuŝita kiam ili eksplozivas vian domon.



El Italio venis nova albumo de **Rêverie**, progresiva folk-bando el Milano, Italio, “Shakespeare, la donna, il sogno” kun du esperanto-kantoj helpe de la kunlaboro de Andrea Fontana (Anĉjo).

Metalo en esperanto

Marco Turco el Mondovia (Cunco) en Italio, estas nova esperantisto kaj drumisto en du metalaj bandoj kiuj registris po du esperanto-kantoj por siaj respektivaj KoDiskoj “Akerono” kaj “Venĝo”, kiujn ili prezentis en la IJK en Hungario ĉi somere. Temas pri la unuaj kantoj en tiu pezmetala stilo, kiuj estas eldonitaj en Esperantio.



Bertilo Wennergren (Persone) kaj **Birke** (lia edzino) muzikas kune kaj okupiĝis pri la verkado kaj komponado de novaj kantoj laŭ folka stilo... Kun Bertilo ĉe gitaro kaj Birke ĉe fluto. Ilia unua provo kun la kanto “La diboĉulo” jam disponeblas en la paĝo de Bertilo (www.ipernity.com/home/bertilow).

VKKD 93 “Fek al Esperanto” - La Pafklik

La fama hiphopa grupo, La Pafklik, eldonas la unuan hiphopan albumon 100 % en Esperanto! Per altkvalita sono rekte el suburba Parizo, la du repistoj alĵetas acidajn, humurajn kaj politikajn vortojn. La albumo enha-



vas diversajn stilojn kun de G-funka repo kun dolĉaj virinaj ritmenblusaj (R&B) voĉoj, rep-metala, ĝis durker-naj stiloj.

KEF 9, someraj, aŭtunaj kaj vintraj renkontiĝoj

La naŭa KEF, kiu devintus okazi pasintsomere estis prokrastita al 2009 pro ĉefe financaj kialoj... tamen estis organizita unutaga KEF-eto la 12an de julio en Kopenhago por jam varbi pri la venonta KEF kiu okazos de la 7-a ĝis 12-a de julio 2009 en Helsinĝör (Helsonoro) norde de Kopenhago. KEFeto estis tre agrabla kaj etosa eta renkontiĝo en kiu partoprenis proksimume 40 homoj.

Kompreneble dum somero okazis multaj kulturaj eventoj, interalie, okaze de la kongresoj, TAKE en Kanado kie ludis JoMo, en Rotterdamo, dum la UK, kie sin prezentis multaj



diversaj artistoj interalie la triopo Ĵomart, Nataŝa kaj Karina kaj JoMo, en Hungario en la IJK kun diversaj esperanto-artistoj kiel Paŭlo Moĵajev kaj ankoraŭfoje JoMo.

Septembre en Poznano (Pollando), la festivalo ARKONES 2008 gastigis Ale Cosavella, La Perdita Generacio, Ĵomart & Nataŝa, Zuzana, ktp. Ale Cossavella kaj Martin Wiese sin prezentis en la Kataluna Transpirenea



Kongreso en Sabadell komence de decembro.

Alejandro Cossavella, la fama argentina artisto (kantisto kaj gitaristo de



la Porkoj kaj Strika Tango) venis eŭropan por tuta serio de koncertoj, kiuj ekis en ARKONES en Poznano. Lia turneo estis kunordigata de EUROKKA kaj li poste ludis en Berlino, Kopenhago, Kanariaj Insuloj (Hispanio), Belgio, Nederlando (Malferma Tago ĉe la Centra Oficejo de UEA), Francio, Katalunio. La turneo finiĝis en Germanio komenco de januaro en 2009 post koncertoj en la tri jarfinaj aranĝoj en Germanio, IS / IF / NR.

Kompleta katalogo estas trovebla ĉe www.vinilkosmo.com

(Laŭ raporto de Floréal Martorell kaj Mark Eaton, kun plej muzikaj salutoj al ĉiuj legantoj)

La biblioteko en ligne Europeana

Le site d'Europeana (la biblioteko en ligne eŭropena) est de nouveau accessible (www.europeana.eu/portal). Pour l'instant, il ne référence malheureusement que 57 documents relatifs à l'esperanto.

Europeana est une biblioteko numérique eŭropena lancée en novembre 2008 par la Commission eŭropena. Elle fait suite au prototype de biblioteko en ligne développé par la Biblioteko nationale de France (BnF), dans le cadre du projet de biblioteko numérique eŭropena.

Au départ, le projet est lancé sous l'appellation de Biblioteko numérique eŭropena (BNE ou BNuE). L'objectif de la BNE est de créer un patrimoine culturel eŭropen et transnational, sous forme numérique, accessible depuis Internet et gratuit pour les œuvres libres de droit. Le nom Europeana est repris du projet de biblioteko numérique de la France, du Portugal et de la Hongrie.

Concrètement, Europeana est une mise en commun des ressources numériques des bibliotekoj nationales des 25 États membres. On entend par ressources livres, matériel audiovisuel, photographies, documents d'archives etc. Pour cela, les États s'engagent à numériser leurs contenus actuellement conservés de manière traditionnelle, les rendre accessibles sur internet et assurer la conservation de ceux-ci sous



forme numérique pour les générations futures. Le projet prévoit de faire appel, outre les bibliotekoj nationales, aux bibliotekoj eŭropenes, aux services d'archivages et aux musées. Pour l'instant, tous les membres de l'Union Eŭropena sont parties prenantes dans le projet, sauf le Royaume-Uni.

(d'après Wikipedia, information communiquée par Jacques Baratié)

Vienaj legendoj

Kio komuna inter starigo de mezepoka turo kaj misaventuro de esperantistoj en la urba zoologia parko ? Ĉiuj el tiuj "Vienaj legendoj", koncernas la urbon Vieno. Interese, la redaktintoj vicigis mallongajn rakontojn el diversaj epokoj kaj el diversaj sociaj dimensioj. Kaj jen kiel la Morto enmiksiĝas en strikte privataj aferoj por reĝustigi ies morojn, kial restis en kroniko la nomoj de la urbanoj post la nigra pesto, kiel la blanka kuniklo lavite revenis en sian kaĉon post enterigo, kiel elefanto spicas la vivon de kompatinda familio kaj kial foje ridindas malfido...

En ne tro komplika lingvo, jen do sep agrablaj rakontoj, el kiuj kvar el mezepoko kaj 18a jarcento kaj tri

originalaj el esperantista tradicio. Christian Cimpa kaj Herbert Mayer jam en 1992 eldonis tiun broŝureton "Vienaj legendoj, antikvaj kaj originalaj". Tiel ili celas evidentigi, ke inter la "produktoj de longa rakonta tradicio" kaj la originalaj legendoj rakontitaj de la esperantistoj, ekzistas simileco. "Kun la tradiciaj legendoj [la originaloj] havas komunan la fakton, ke ilia temaro aperas multloke dise tra la mondo. Ĝojigas nin, ke ili estas signo de iom post iom estiĝanta popola rakont-tradicio originala".

"Vienaj legendoj antikvaj kaj originalaj", de Christian Cimpa kaj Herbert Mayer (IEM Vieno, 1992). Broŝuro, 40 p.

MHD

Esperanto, lingvo de kulturo kaj personeco

Ĉu vi ankoraŭ dubas, ke Esperanto ne estas nur komunikodo kaj havas propran kulturon? Nur legu la libron de Aleksandro Melnikov “Esperanto, lingvo de kulturo kaj personeco”. La libron mem konsistigas tri eseoj pri la temo “kiel E-kulturo reflektiĝas en nia lingvo kaj efikas je la lingva personeco de esperantistoj”. Se vi iam kredis, ke Esperanto estas lingvo simpla kaj senmistera, nur konsciuj ke por komencanto, multaj esprimoj kaj parolmanieroj atestas pri nedivenebla hereadaĵo, kiun li ne povas atingi sen interesiĝi pri la movado ĝenerale kaj la originala literaturo, kvazaŭ infano antaŭ koridoro, malantaŭ kies fermita pordo bonodorus netuŝebla kuko. Ne ridu, se vi ne konvikiĝis ke esperanta historio gravas por kompreni la lingvon, diru nur, kiel vi sukcesas klarigi al viaj lernantoj, kial la lingvo ne estas tiel logika, kiel en la varbilo, se ne pro historia logiko?

La eseo povus esti teoria kaj enua, sed

eĉ post la humurplena enkonduko, en la demonstrado de Valentin Melnikov abundas ekzemploj, literaturaj referencoj kaj esprimoj el la ĉiutaga uzo de Esperanto. Do neniu timu pro tiu sufiĉe mallonga libro, kiu rapide pravas senecese, ke Esperanto formis tutan komunumon kun komunaj referencoj kaj ke tiuj referencoj samtempe konsistigis gravan parton de la lingvo mem.

Piednotoj sufiĉe ofte indikas tre utilajn referencojn kaj klarigas ĉion, kion nova esperantisto povus ignori por ĉion kompreni. Facile legeblas do tiu grava libro tre necesa por kompreni, kio vivas malantaŭ la kutimaj esprimoj de la esperantista vivo. Ĉar se ĝi facile enkondukas komplikajn etosojn inter spertaj fluparolantoj per ŝercoj aŭ vortludoj, ni povas imagi ke tiu ne tuj atingebla parto de la kulturo povus timigi novbakitajn esperantistojn. Kiel komencantino mi tre bone memoras la incitan miksaĵon inter esperantaj sigloj, asocioj, aludoj, misteraj ŝercoj

rilate al la lingvo kaj ties gravuloj. Kaj do iasence A. Melnikov pledas por iom da atento, en la lernado kaj instruado de la lingvo, por tiu sukoplana sed ne sufiĉe ofte emfazita aspekto de ties kulturo.

“Esperanto, lingvo de kulturo kaj personeco”, tezo de Aleksandro S. Melnikov, 95 p. (Eldonejo de la Eŭropa Jura Universitato “Justo”)

MHD

Mallonge

- Vi nun povas SENPAGE elŝuti “La Vertebroscopo-n” (traduko de “Le spondyloscope”, tout sur les douleurs du corps humain) en Savoir-sans-frontières (serĉu 14. Esperanto). Revizita de japana amiko Vastalto.

www.savoir-sans-frontieres.com/JPP/telechargeables/free_downloads.htm

Petro CHIBLEUR

- Le professeur Robert Molimard informe que le livre “La fumado” (qu’il a lui-même traduit en espéranto), peut maintenant être téléchargé gratuitement depuis le site de Tabacologie.fr - <http://tabacologie.fr> - avec l’accord bienveillant de l’éditeur. Il suffit de cliquer sur le bouton “et en esperanto?”, puis sur la couverture du livre pour le téléchargement du PDF. Le livre est aussi en vente à notre service de librairie.

- Voulez-vous suivre un cours de cuisine donné par Daniel Salomon au Japon, ou apprendre à ouvrir (et déguster) des huîtres? Ecouter le message de nos amis béninois invitant à la conférence des enseignants espérantophones? Suivre une conférence du professeur Ivo Lapenna sur “Esperanto kiel lingva esprimo de humaneca internaciismo?” Vous trouverez tout cela sur le blog <http://esperantretfilmoj.blogspot.com/> où Jacques Baratié a réuni plus d’une centaine de vidéos en espéranto.

Ĉu mi malplaĉis al vi?

En tiu porinfana libreto, Marie-France Conde-Rey kaj Nadine Chedouteau kunligis siajn talentojn por havigi al ni juveleton en formo de broŝureto kun alloga kovrilo. Jen rakonto simpla, konciza, kiu per malmultegaj, delikataj vortoj, starigas gravajn demandojn: ĉu trudi sian amon? Kiel respekti la liberecon de la amato? Kiel akcepti ties silenton, distanciĝemon? Kiel akcepti disiĝon?

Nadine Chedouteau ilustris la tekston de M.F. Conde-Rey per nigra-blankaj desegnaĵoj, en propra stilo, iom simila al tiu de Beatrix Potter. La libreton vi povas mendii por donaci al etuloj kaj en Esperanto kaj en la franca, jen interresa, ne unua sed malofta iniciativo

por instigi prilingvajn demandojn de la neesperantista publiko.

Bedaŭro tamen iom malaltigas la plezuron: la prezo vere superas tion, kion ĝenerale pretas pagi esperantista familio kaj supezeble la eldonejo kaj la aŭtoroj ne sukcesos trovi la investitan monon. Tiun libron vendas la la Eldonejo Ĉarenta Esperanto por 8 €, tiel atestante pri la malfacileco eldoni memstare. Tio refoje starigas la demandon: kion kolektive faras la esperantistoj por ebligi eldonadon de porinfanaj libroj?

“Ĉu mi malplaĉis al vi?” de Marie-France Conde-Rey kaj Nadine Chedouteau (Eldonejo Ĉarenta Esperanto, 2008), broĉuro, 16 p.

MHD

Raportoj el Japanio 11

Jam dekonufoje, HORI Jasuo publikigis siajn "Raportojn el Japanio". Kiel ĉiam, la lingvaĵo de HORI klaras, simplas, celas ĉiujn sendistinge kaj tre taŭgas por progresantoj. Ĉiufoje kun konstante klara konvinko kontraŭ militemo. Ĝin fortigas ĉiu evento el la japanaj kaj tutmondaj aktualaĵoj, sen forgesi lecionojn de dolora historio. Granda proporcio de la tre diversemaj artikoloj pli malpli klarigas tiun fortan konvinkon, per ekzemploj tiritaj el la ĉiutaga vivo en la japana socio. HORI interesiĝas pri ĉio, elvokante kaj la historiajn kaj la politikajn eventojn, ankaŭ popolajn tradiciojn. Liaj elvokoj pri la dua mondmilito montras kiel li pacamanto, konscias

pri la danĝero de ŝovinismo kaj liaj elmontroj ĉiam celas vekti nin el tro facila indiferento. Verdire, ne konante Sinjoron HORI Jasuo, mi pli kaj pli ŝatas lin. Liaj libroj igas lin proksima kiel saĝoplana najbaro, konsilanta ankaŭ pri kiel bone nutri sin kaj teni sian korpon varma por resti sana. Cetere pripensu, ĉu vi ne ekhavu hejme Jutanpo, litvarmigan poton, por ĝuste rehonorigi malnovan kaj bonfaran kutimon, dum la frosta sezono.

"Raportoj el Japanio – la lumo iom venkis la mallumon" de HORI Jasuo (Libroteko Tokio, 2008)



MHD

Belartaj konkursoj de UEA en 2009

La gvida esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 60-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 94-a Universala Kongreso en Bjalistoko. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj kaj kantoj, antaŭe ne publikigitaj en ajna formo.

Krome validas la subaj kondiĉoj :

- **POEZIO** : Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.
- **PROZO** : Maksimuma longo 13 000 karaktroj. Tri premioj.
- **TEATRAĴO** : Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.
- **ESEO** : Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo ("Krei pacan ponton inter la popoloj" : Zamenhof hodiaŭ). Proksimuma longo 10 tajpitaj paĝoj ; ĉ. 25 000 karaktroj. Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.
- **FILMO** : Teme ligita kun Esperanto

aŭ kun la kongresa temo (vd. sub Eseo). Daŭro 15-60 minutoj. Tri premioj.

- **KANTO** : Originala, publikigita en 2008 (la teksto kaj melodio povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj) ; publikigo signifas unuan publikan prezenton, aperigon en Interreto, aperigon en kompakta disko, k.s. Premio "An-Song-san" kaj du aliaj premioj.
- **INFANLIBRO DE LA JARO** : Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2008. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo kaj eseo, oni sendu ilin en unu ekzemplero ; por la Infanlibroj kaj Kantoj, en tri ekzempleroj. Principe ĉiuj konkursaĵoj, escepte de infanlibroj kaj filmoj, estas akcepteblaj rete.

Ĉiuj konkursaĵoj alvenu plej laste la 31-an de marto 2009. Ĉion oni adresu

al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio.

Rete al michela.lipari@tiscali.it.

La konkursaĵoj (krom kantoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj la adreso estu en aparta retmesaĝo aŭ, se oni sendas la tuton poŝte, en koverto.

Premioj : Unua premio 240 EUR, dua premio 168 EUR, tria premio 96 EUR, Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 168 EUR, Infanlibro de la Jaro 504 EUR.

Publikigo : La rajto je la unua eldono de la premiitaj verkoj ne jam eldonitaj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ĝi legeblas ankaŭ ĉe http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html.

Al Esperanto-kolektantoj

Ĉu vi jam aŭdis pri ELF-Arek? Fakte, mi preskaŭ certas, ke plejmultaj el vi neniam vidis tiun siglon. Temas tamen pri tutmonda esperantista asocio, kiu koncernas

speco de esperantistoj, ŝajne tre apartan, ĉar neniam videblas artikolo pri ilia agado en la E-gazetaro. Tiu siglo signifas "Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantistoj-Kolektantoj". Kvarfoje en la jaro ĝi eldonas bultenon "La Verda Lupeo", kiu informas pri la plej freŝdataj trovaĵoj de la aliĝantoj, rilataj al ilia ŝatokupo.

Tiu asocio interesas tri specojn de E-kolektantoj:

1 - La filatelistoj, kiuj kolektas filatelajn (poŝt-markojn, poŝt-stampojn, tutaĵojn, ktp.).

2 - La kartofilistoj, kiuj kolektas poŝtkartojn.

3 - Le erinofilistoj, kiuj kolektas... Serĉu iomete, kion ili ja povas kolekti, iom da cerbumado neniam malutilas, ĉu ne? Do bone, mi ne suferigas vin pli longe, erinofilistoj kolektas glumarkojn, vinjetojn ofte videblajn sur kovertoj de esperantistoj, kiuj ebligas reklami senpage pri la lingvo aŭ iu E-evento.

Jam en la unuaj jaroj de la dudeka jarcento

La unuaj E-poŝtkartoj aperis en la unuaj jaroj de la dudeka jarcento. "En Francio la unuaj eldonitaj estas la serio de L. Hennebert, apotekisto en Pont-en-Royans, ĉirkaŭaĵe de Grenoble" en la jaro 1905 (laŭ Jean Amoureux

en "Franca Esperantisto" n-ro 509) (1). La temoj de la ilustraĵoj estas plej diversaj, i.a. famaj esperantistoj, kongresoj, renkontiĝoj, frapfrazoj,



ktp)

La unuaj glumarkoj datiĝas je 1906 por la dua UK, en Genevo. Nuntempe ekzistas pluraj miloj da ili, sed kelkaj malnovaj estas malfacile troveblaj. La temoj estas ankaŭ tre diversaj. Estas tamen du ĉefaj grupoj, kun aŭ sen datoj. La dua grupo estas pli multnombra kaj diverstema.

Unu surskribo en Esperanto sufiĉas

Tutaĵoj estas poŝtkartoj (aŭ kovertoj) kun alpresita poŝt-marko. Ili estas tre interesaj, ĉar unu surskribo en Esperanto sufiĉas, por ke ili estu agnoskitaj kiel E-tutaĵoj. La unuaj aperis en Sovetunio decembre 1925, kun la surskribo en E-o „Poŝtkarto”. En la jaroj 1925 -1939 pluraj landoj oficiale eldonis tutaĵojn por reklami siajn turismajn vidindaĵojn (Brazilo, Hungario,

Liĉtenŝtejno, Nederlando, ktp.) Tio montras, kiom alte tiuj landoj tiam taksis Esperanton. (2)

La plej rara estas franca

La unua poŝt-stampo aperis en 1912 okaze de la oka UK en Krakovo, sed ĝi estis simpla apudstampo kaj ne povis esti uzata por nuligi la poŝtmarkon. La plej rara estas franca, trovebla sur la tre maloftaj leteroj senditaj de porokaza poŝtoficejo en la Palaco Gaumont en Parizo por la deka UK, kiu daŭris nur kelkajn horojn pro deklaro de ĝenerala mobilizado la 2an de aŭgusto 1914. Hodiaŭ pli ol mil poŝtstampoj estas kolekteblaj.

Apenaŭ 60 poŝtmarkoj pri Esperanto en la mondo

Fine, la poŝtmarkoj pri Esperanto ne multas en la mondo. Apenaŭ 60 kaj neniu franca. La unua aperis en 1925 en Sovetunio, tuj post la agnosko fare de UPU (Universala Poŝt-Unio) de Esperanto kiel "klara lingvo". La plej nova estas nederlanda, eldonita okaze de centjariĝa jubileo de UEA (2008). (3)

La kolektebla materialo estas do sufiĉe ampleksa, por kontentigi kolektantojn. Ni ne forgesu, ke tia kolekto ankaŭ tre taŭgas por montri, kio estas Esperanto. Se E-kolektantoj deziras ricevi pliajn informojn, aŭ kuniĝi, por interŝanĝi filatelajn informojn, ili skribu al mia retadreso, jeanpierre-ducloyer@club-internet.fr

Jean-Pierre Ducloyer



Nouvelle BD : Esperanto

(1) *Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj.* Jean Amouroux. UFE. Paris. 1999. 82 paĝoj.

Priskribo de pli ol 160 kartoj de antaŭ la Dua Mondmilito

Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj. Dua parto. Jean Amouroux. UFE. Paris. 1999. 86 paĝoj. *Reprodukto, kun historiografiaj komentoj, de pli ol 160 kartoj de post la dua mondmilito.*

(2) *Estas virtuala ekspozicio ĉe Eventoj kun esperantaj bildkartoj, poŝtkartoj. Kolekto kaj ekspozicio. Prezento de pli ol 1400 bildkartoj kun serĉeblo laŭ eldon-lando kaj 11 aliaj kategorioj.*

www.eventoj.hul/bildkartoj

(3) *Poŝtmarko pri la 100-jara UEA. Okaze de la 93-a UK en Roterdamo, UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun la kongresa simbolo. Ĝi fariĝis grandega sukceso kaj praktike elĉerpiĝis jam dum la UK. Malgraŭ multaj petoj ĝi ne estis reeldonita, ĉar post la paso de la UK ĝia temo ne plu estis aktuala. Nun ĝi estas ŝatata objekto ankaŭ ĉe ne-esperantistaj kolektantoj, kiuj en retaj aŭkcioj pagas por ĝi multe pli altan prezon ol la originala vendoprezto.*

La furoro de la kongresa poŝtmarko tamen instigis UEA mendi novan markon pri temo, kiu ja ankoraŭaktualas, la jubilea jaro de UEA. La nova marko aperis en novembro kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por ordinara letero en Nederlando. Ĝi montras la jubilean simbolon de la 100-jara UEA, desegniton de Guillem Sevilla, kun la teksto "100 jaroj universala esperanto-asocio".

La jubilea poŝtmarko estas vendata en folioj de 10 markoj kaj ĝi estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kosta EUR 5,50 (plus afranko, kvanta rabato ne estas aplikebla). Ankaŭ tiu ĉi marko estis eldonita en tre limigita kvanto.

Je viens de finir de lire la BD et... ce n'est pas mal du tout ! Un peu de fantastique, d'histoire, d'ésotérisme, d'action, d'amour et de lutte entre le bien et le mal à travers les âges, le tout dans une ambiance "rétrofuturiste" plutôt réussie. Un petit regret néanmoins, l'auteur a pris quelques libertés dans les rares textes rédigés en espéranto : "azarda", "Dua mundo milito", "Minus labori plus mono", etc. Néanmoins la tonalité générale n'est pas hostile à l'espéranto. Le héros principal dit page 85 à propos de la ville Esperantia : "Ici tout le monde parle espéranto tandis que chez nous, seuls quelques idéalistes romantiques l'utilisent". De retour dans notre monde (page 118) il répond plus positivement au libraire newyorkais qui lui dit : "Une langue uni-

verselle que personne ne parle ! Sacré truc ! " par "Tu te trompes Ebenezer. Ils sont des millions...". En fait, le seul qui dit du mal de l'espéranto dans cet album, c'est le méchant de l'histoire, un sadique ancien nazi qui déclare (page 93) : "L'espéranto est une langue vulgaire, sans racines, oecuménique. Ça sert à quoi de contenter tout



Otto Gabos



le monde? Une langue faite par un juif". Un bon cadeau donc à faire si on cherche un moyen original d'éveiller sans brusquerie la curiosité des gens vis-à-vis de notre "kara lingvo".

En cherchant sur Google, j'ai trouvé le blog de l'auteur italien de cette BD (Otto Gabos) et je me suis permis de lui écrire pour m'étonner de l'usage approximatif de l'espéranto dans son album. Sans se vexer, l'auteur a pris le temps de me répondre (en anglais) pour m'expliquer que les distorsions observées étaient volontaires car il souhaitait que l'espéranto de sa ville fictive (Esperantia) soit un espéranto "mutant".

Jacques Baratié

<http://www.graphivore.be/critiques.php?critiqueid=3826>

Deux vélos à l'horizon : le tour du monde de Rose et Cyrille

« Ne rêvez pas votre vie, vivez vos rêves ! »



Roz' kaj mi, Cirilo, planas kune trabicikli la mondon dum du jaroj.

Ni startos de Narbono, en suda Francio, la 16an de marto 2009. Ni jam ĉi-septembre realigis prologon

biciklante de Parizo al Narbono. Baldaux komenciĝos nia 2-jara vojaĝo, kiu, laux nia nuntempa plano, pasos tra Nico, Venecio, Dubrovniko, Tehrano, Delhio, Singapuro, Sidnejo, fluge al Vankuvero, Los-Anĝeleso, Meksikurbo, Panamurbo, Limo, Santiago, Buenos-Ajreso, Rio-de-ĵaneiro, laux la disponebla tempo fluge al Dakaro aux Lisbono, Barcelono kaj fine denove Narbono.

Eblas akiri pli da informoj en nia TTT-ejo: <http://horizonto.free.fr/>
Se vi opinias, ke vi loĝas pli malpli ĉe nia itinero kaj se vi volas parte kunbicikli, renkonti nin por reklami pri Esperanto aux gastigi nin, ne hezitu



kontakti nin.
Salutations tour-du-mondistes,
ĉirkauxmondajn salutojn,
Roz' & Cirilo <horizonto@free.fr>

Manifestacio por diskonigi la valoron de Esperanto por Europa Unio

De la 29a de junio ĝis la 13a de julio 2008, de Parizo ĝis Kompostelo, tra Francio kaj Hispanio kaj revene al Parizo, pli ol 3800 km buse. Paginte sian seĝon, loĝejon, manĝaĵon, dudeko da personoj faris tute aux parte tiun vojaĝon. Ne sufiĉis brakoj por ĉiuj materialoj. Mono ne superfluis. Mi klopodis organizi tiun aferon dum pli ol du jaroj, sed ne sufiĉe bone... Tamen ĝi okazis, kvankam antaŭe multaj dubis. Eĉ dum la UK en Roterdamo, pluraj homoj esprimis sian miron: "ĉu vere...?" Mi neniam komprenis, kial oni ne kredis, ke tutsimple mi faros, kion mi anoncis.

Plej multaj ne komprenis, ke ne temis pri pilgrimo, longa piedirado aux turismo. Oni devis nur **MANIFESTACII** ĉiutage kaj plej eble tuttage,

laux la vojo kaj etapoj. Mi nun agnoskas, ke mi tro postulis.

Unuan celon ni ĉiam atingis, esti tre videblaj, amuze kaj afable.

Due, disdoni milojn da flugfolioj. Ankaux tion ni faris.

Same, samtempe, afiŝi diversajn sloganojn por pensigi pri lingvaj problemoj en Eŭropa Unio, do estante pretaj respondi, informi pri raporto Grin, diskuti, argumenti, ktp. Helpis profesia klaŭno, gaja akordionisto, humura banderolo, multaj paneletoj, kultura aĉetkorbo, porlingva rubujo, verda flegisto por lingvoj, flago, T-ĉemizoj, ktp.

Posta efiko? Ni multe semis, ktp. Kaj eĉ eraroj kaj malsukcesoj instruis, kiel multe pli bone manifestacii poste. Tiu ideo dauxre valoras. Indas ripeti tiun tute novan agadon. Michèle Abada-Simon

Bateaux en vidéo

Le nouveau film de présentation du service de visite de Strasbourg en bateaux, Batorama, fait une large place à l'espéranto.

Vous pouvez visionner ce film sur le site du port autonome de Strasbourg ou directement à l'adresse : <http://www.batorama.fr/visite-de-strasbourg-en-bateau-r72.htm>

(Cyrille Hurstel)

